Wilhelm Hauff,

Nokta kanto de soldato

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

En nigra nokto tute sole
Mi staras gardon senparole,
Eraras for la penso mia
Al mia domo familia.

Al la standardo fortirita,
Ho, kiom estis mi kisita . . .
Mi tiam pensis kun malĝojo :
Mi vidas vin je l' lasta fojo!

.....
.....
.....
.....

Ho dormu dolĉe, karaj miaj!
Irante al la litoj viaj,
Vi nun per preĝo Dion gloras, –
Vi certe ankaŭ min memoras.

.....
.....
.....
.....

. . .

La horo venis, gard' alia
Stariĝos nun sur loko mia.
Mi iras dormi tute laca,
Mi vidos vin en sonĝo paca.

Traduko de la Germana poemo "Treue Liebe" de Wilhelm Hauff *(∗1802-11-29 – †1827-11-18) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1012-2050 (2014-05-17 17:15:32)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php` .